Aprilo 1952 N ro 414 Jarkolekto 49


ESPERO KATOLIKA

Oficiala monata organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.), fondita de Abbé Richardson en 1910 en Parizo

Redakcio kaj Akministracio· Espero Katolika··VLEUTEN (Utrecht), Nederlando

Kunlaborantoj d··ro E J Görlich(Aŭstrujo),Robert Ernst,sac (Belgujo) Ludwig Thalmaier sac (Germanujo), J Vernoux,sac (Francujo), Eusebio Maynar (Hispanujo), Prof. H.G Wannemakers S.J. (Indonezio), G. Ellerman kaj d··ro W.J.A Manders (Nederlando), d··ro W Solzbacher (Usono).

## KRISTO, NIA ESPERO, REVIVIĜIS EL LA MORTO,




La plej granda festo en la katolika Eklezio istas la Paska Festo,pli granda pli grandioza ol la Kristnaska Festo. Ĉar ĝi estas la atesto de nia kredo

Kiel premantan sonĝon la disĉiploj de nia Sinjoro Jesuo Kristo ĉeestis Lian suferadon kaj morton Dum kvardek tagoj, kaj speciale dum la lasta semajno la kristanoj primeditis tiun suferon sanktan de nia Dia Majstro Kaj tiam venas la reviviĝo grandioza,mirakla kaj impona. Ja ĝi estas la atesto de Lia dia potenco kaj de nia firma kredo Pasko, la festo de renoviĝo, la festo de la printempo, la venko jen ĝi estas denove Mirigite kiel la disĉiploj ankaŭ ni ĉeestas ĝin ĉiujare. Kaj niaj pensoj reiras al la unuaj tempoj de la kristanismo Same kiel Kristo forlasis sian tombon, la Eklezio forlasis la katakombojn. Ekregis longa periodo de bonfarto en la mondo. artoj kaj sciencoj atenstas tion. Tamen vivantaj en la nuna tempo oni ofte devas pripensi unuan venkon de la katolika Eklezio, venko al paganismo kaj aliaj eraroj Kaj nun ni. katolikoj, ne povas gardi tiun venkon.

Tralegante la ĵurnalojn, oni povas konstati malesperon pri la venko de la kristanismo al la modernaj paganismoj, komunismo, materialismo kaj kapitalismo aŭ sub kiu ajn nomo ĝi sin prezentas.

Oni elpensis novajn rimedojn por venkigi la kristana ideo kaj tamen ŝajnas ke ni ne progresas Kial ne? Akra observanto povas konstati ke ofte mankas la plenumo de la plej granda ordono de Kristo la amo al la proksimulo.

La unuaj kristanoj donas al ni la ekzemplon, kiel atingi la venkon' 'Vidu kiel ili sin reciproke amas. Tiuj vortoj venas de nekristanoj Tro ofte ni forgesas ke eĉ kun la plej bonaj modernaj sistemoj ni ne povas atingi la pacon de Kristo, se ni ne praktikas la amon.

La amo estas la bazo de nia kristanismo kaj sen la amo ni nenion atingos. Kristo alportis sur la mondo la pacon kaj ni gardos ĝin se ni estas veraj kristanoj Frato por via frato.

Li reviviĝis kaj Li restos kun ni, se ni amas nian proksimulon kiel Li amas nin.

A Beckers, sac.
prezidanto.

# ĈU LA MONDHISTORIO HAVAS SENCON?

de

**Maksimilian Maria Mielert**

(daŭrigo)

En la orientkolonigado la mezepokaj germanaj imperiestroj venkis, sed ne ĉefe per la glavo sed per la kruco, montrante tiamaniere grandecon, kiel ne niam antaŭe aŭ poste en la mondhistorio: Laŭlonge de la linio Elbo-Sale ili stari ĝis vicon da episkopejoj. Jen la mirindaj fortifikaĵoj de la katolika mezepoko. Per tio la germanoj montriĝis veraj "Christophori", t.e. "Kristportantoj" kaj ĝuste tio estis la ĉeftasko de la germana popolo, ĝia profesio en la mondhistorio. Tiom longe, kiom ĝi plenumis tiun taskon, ĝi estis ŝatata kaj estimata en la mondo. Oni vokis germanajn kampulojn kaj metiistojn orienten ĝis la vasta Rusujo. Kiam ĝi ĉesis plenumi sian profesion, komenciĝis ĝia malsupreniro. Ĉu senco?

La ĉefdemando denove sonas tra la mondo de la 16a jarcento. Tiam temis pri la Eŭkaristia Kristo, pri la kredo al Lia estanteco en la Plejsankta Sakramento. La tiel nomitaj "reformatoroj" Luther, Calvin, Zwingli ka respondis parte per duona parte per tuta "ne"! La nova doktrino havis nemezureblajn sekvojn. Ĝi ĉesigis la tablokomunecon inter la kristanoj.

Ĝis Luther ĉiuj baptitoj estis unuigitaj en la komuna ofermanĝo.

Nun ĉesis la "Komunio", t.e. ĉesis la komuneco inter la kristanoj, malaperis la "Komuni-senco". Jen la plej granda malfeliĉo en la mondo, ĉar ekde tiu tem po la kristanaro jam ne formis firman fronton kontraŭ la spirito de la neado! Tiu vundo de la germana popolkorpo fariĝis la mortvundo ne nur por la Sankta Romana Regno de la germana Nacio, sed ankaŭ por la tuta mondo. Ni nur memoru pri la terura respondo de la mondhistorio: pri la unua "mondmilito", la 30-jara! Ĉu senco?

Ankaŭ la 18a jarcento starigis la ĉefdemandon, sed respondis ĝin eĉ terure vere diable. En Anglujo estiĝis la liberpensuloj, la libertinismo, la framasonaro en la jaro 1717. Kaj oni komparu 1517; 1717, 1917! Ĉu hazardo? Nepre ne, sed terura respondo de la mondhistorio! Ni ja scias, ke la framasonaro rifuzas ĉiun revelacion, ĉiun kristanecon, kvankam ĝi penadas, nei tion.

La malboneco ne konas landlimojn. La satana movado transiris de Anglujo al Francujo, al Germanujo ktp.

La sekvoj devis esti komuna anarĥio. Baldaŭ tiu jarcento havigis al Eŭropo la novan "mondmiliton", la sepjaran. Sekvis ree "mondmilito" en la tempo de la franca revolucio kaj dum la regado de Napoleono. Bonvolu atenti pri la batalceloj! Batalado kontraŭ

1-e la altaro, t.e. kontraŭ la katolika Eklezio!

2-e la trono, t.e. kontraŭ la ŝtata aŭtoritato!

3-e la familio per la enkonduko de la eksedziĝo!

4-e. la propraĵo per la jam tiam komencanta komunismo!

Ĉu la modernaj ribeluloj havas aliajn celojn! Nur pli diablajn, pli inferajn metodojn! -En Berlino oni povis aŭdi en la jaro 1800 la vorton: "Ankoraŭ nur ataketo estos necesa, ĝis kiam la nomo de Jezuo malaperos el la historio! Kaj la respondo de la mondhistorio? En la jaro 1806 vere nur "ataketo" dum 2 horoj ĉe Jena-Aŭerstedt estis necesa, kaj Prusujo preskaŭ por ĉiam malaperis el la historio! Ĉu hazardo? Ĉu senco?

Sekvas la 19a jarcento. Kiel ĝi respondis la ĉefdemandon? La filosofo Ed. de Hartmann donas respondon en sia libro "La kristaneco de la Nova Testamento". Li diras: "Tiel Jezuo ŝajnis esti al la unua poeto, al 2a mistika fantaziulo, al 3a militema heroo por libereco kaj homrajtoj, al 4a ordiganto de nova eklezio kaj eklezia moralo, al 5a. racionalisto, al 6a moralisto de l' ŝana homprudento ktp. ktp. ĝis senfino. Hartmann estas prava. Sed al kiu Jezuo estis kaj estas tia, kia Li vere estas: Savinto, vera Dihomo, fordonante siajn vivon kaj sangon por ni maldankemuloj?!


La 19a kaj 20a jarcentoj donacis al la homaro la plej grandajn progresojn sur la kampoj scienca kaj teknika. Tamen tiom malmulte da beno, tiom multe da malbeno! Kial do? En la paradizo staris 2 arboj: la arbo de la ekkono kaj la arbo de l' vivo. Niaj pragepatroj manĝis frukton de l' arbo de la ekkono kaj mortis. En la pasintaj epokoj la homoj manĝis pli kaj pli multe de la arbo de l' ekkono kaj la morto faris kaj faradas teruran rikolton! Ĉu sekvo de la progrese-

meco? Tute ne! Dio ja volas kaj ordonis la progreson (do ankaŭ Esperanton ĉu ne?) sed kian progreson? Per nekredo kaj senmoraleco la homoj malproksimiĝis pli kaj pli for de la arbo de l vivo t e for de Kristo!
Komence ni atentigis pri la ofte decida influo virina en la mondhistorio Tio valoras plejgrade pri Maria Helpantino de la kristanoj Venkintino en ĉiuj bataloj de Dio ! Ni nur citu kelkajn ĉefdatojn (laŭ la nova libro de Joh Maria Höcht Fatima und Pius XII Wiesbaden 1952 Credo Verlag) Jam la imperiestroj de la orientroma regno lasis protekti siajn armeojn kaj ŝiparojn de la Nikopeia t e de la Efikantino de l Venko sukcesante tiel en multnombraj venkoj Pli frapantaj estis la venkoj de la Dipatrino kontraŭ la islamo en Hispanujo Ankaŭ Karlo Granda favorate de Maria venkis en multaj bataloj kaj la starigo de la Katedralo de Nia Kara Sinjorino en Aachen estis lia danksigno Skapulierfesto 1212 Reĝo Alfonzo de Kastilio venkis sub neordinaraj kondiĉoj la maŭrojn en la batalo de Naves de Tolosa 1250: la kristanoj sukcesas en la batalo de Sevilla forpelante la islamanojn el Hispanujo dum ili alvokis la dolĉan nomon de Maria kaj portis antaŭe ŝian bildon. Plue ni citu la famajn venkojn de Maria ĉe Belgrad (1456), kie la Sankta Johano de Capristano insiste petegis la Dipatrinon ĉe Lepanto (7 10 1571) kie la anoj de la Rozarikongregacioj batalis, petante Maria-n, dum la granda honoranto de Maria papo Pio Va persistis preĝante kaj vizie vidis la mirindan venkon samtempe en Romo Ek de tiu tago ni festas la altan feston de 'Nia Kara Sinjorino de l Venko', la 'Rozarifeston Ankaŭ en la 'Batalo ĉe la Blanka Monto (8.11.1620) la oktavtagon de la festo de 'Ĉiuj Sanktuloj oni portis antaŭe bildon de la Dipatrino kaj alvokis la karajn nomojn de Jezuo kaj Maria, kaj la venko fariĝis brilega. Pri la granda generalo Tilly kiun oni vane klopodis kalumnii kiel bruliganton de Magdeburgo, oni scias ke li venkis en 32 bataloj ĉiam sub la protekto de Maria, kies standardon li ĉiam lasis porti antaŭe Fine ni citu la faman venkon de Maria ĉe Vieno (12.9.1683) kie la kapuceno P Marcus de Aviano alvokis la Dipatrinon sukcesante en vere decida venko de la kristana okcidento kontraŭ la gravega danĝero de l islamo
Alproksimiĝas en nia konsiderado la estanteco kaj kune kun ĝi ankaŭ la veno de l antikristo laŭ vorto de l papo Pio Xa Ni do ne miru, se la tero fariĝas ebria de la sango de nenombreblaj homoj kulpaj kaj senkulpaj Ŝajnas, ke la tuta infero malpleniĝis sendante ĉiujn siajn diablojn teron La mondmilito 1914 18 pasas sed kvankam la protestantoj antaŭ la milito estis esperintaj povi festi 1917 la 400 jaran datrevenon de sia herezo ĝuste tiu jaro dum kiu la germana protestanta kanceliero estis rifuzinta la pacmanon de la papo fariĝis la plej terura malsatjaro kaj preparis la finkatastrofon! Germanujo helpis al la ribeluloj Lenin kaj Trotzki prepari la revolucion en Rusujo Ni ne miru ke ĝuste la rusoj pro tio fariĝas niaj venĝdemonoj! Kaj bone atentu En la sama jaro kiam en la oriento eklumis la sangoruĝa brilaĉo de la bolŝevista revolucio kiam en la okcidento en Portugalujo la framasonaro post kruelega persekuto de la katolikoj jam jubilis pro la supozota certa venko en la sama jaro eĉ la saman tagon, 13 5 1917 kaj preskaŭ je la sama horo kiam la papa nuncio Pacelli (kies nomo jam signifas pacon) estis konsekrata episkopo en la Sikstina Kapelo en Romo en la sama momento la ĉielo intervenis aperigante la Sanktan Virgulinon en la Cova da Iria ĉe Fatima, kaj ek de tiu ĉi tago komenciĝis senekzempla prospero en Portugalujo! Kaj la lando restis liberata de la bolŝevismo en Hispanujo Ĉu hazardo aŭ mirinda senco? Tiel la miraklo de Fatima ludas eminentan rolon en la vivo de papo Pio XIIa kaj ree atentu ĝuste tiam, kiam oni festis en Fatima la 25 jaran jubileon de la aperoj, kiam la militgloro de Hitler brilis plejalte eksonis la horo de la liberigo: la armeoj de Hitler estis atingintaj Stalingradon la rusa fronto ŝajne estis disrompita, la oleokampoj de Baku ŝajnis esti perditaj, samtempe en la sudo la generalo Rommel estis antaŭenpuŝinta sian kojnon ĝis El Alamein Tiel per du potencaj armeoj Hitler minacis ĉirkaŭi la antaŭan orienton por doni mortigan frapon al la rusa kaj brita imperioj Do Hitler staris sur la supro de sia potenco kaj nenio kaj neniu ŝajnis haltigi sian venkkuradon Tiu finvenko de Hitler estus kaŭzinta nedireblajn sekvojn turmenton, aflikton, persekutojn al la tuta mondkristanaro Estis danĝero kiel antaŭe nur ĉe Lepanto aŭ Vieno Kaj ree regis PIO Pio XIIa sciis kion fari Jam unufoje en la antaŭa

mondmilito la Dipatrino estis deturninta grandan malfeliĉon, kaj la mondo devis ekkoni ke tute alia potenco ol la materio de armiloj kaj kanonoj povas ŝangi militan situacion Tial Pio XIIa memorigis la mondon pri la antaŭdiroj de Maria en 1917' ke okazus pli katastrofa milito se la mondo ne konvertiĝus kaj ke la paco en tiu dua mondmilito nur venos ke eĉ Rusujo konvertiĝos se la papo konsekrus la tutan mondon, precipe ankaŭ Rusujo al la Senmakula Koro de Maria Konsekvence la papo nun plenumis la postulon de la Sankta Virgulino la 31an de oktobro 1942 verkante pro tio la admirindan Konsekripreĝon al la Senmakula Virgulino! Kaj ĝuste tiu konsekriago fariĝis la limŝtono kaj decida ŝanĝo de la milito malvenkoj frapis ekde tiu tago la diktatorajn potencojn de la Akso Ĝis la 31a de oktobro 1942 la Aliancanoj eĉ ne unufoje estis sukcesintaj en pli granda venko, sed nun sekvas por ili ĉeno de deciđaj venkoj La antaŭvesperon de la 31a de oktobro la potenca ŝiparo de la Aliancanoj ekmoviĝis por liberigi Eŭropon 3 11.42 Venko de la Aliancanoj ĉe El Alamein kaŭzante nehaltigeblan remarŝon de la armeo de Rommel ĝis Tunis! 7 11 42 Albordiĝo de la amerikanoj en Nordafriko! Komenciĝas per tio nova epoko en la milithistorio, kaj Roosevelt povis festi tiun tagon kiel unuan paŝon al la liberigo de Francujo kaj de la aliaj okupitaj landoj 19 11 42 Sovjetarmeo disrompis la germanan fronton kaj ĉirkaŭas Stalingradon! Komenciĝas la nehaltigebla remarŝo de la germanaj armeoj en Rusujo Roosevelt diras Ŝajnas ke ni atingis la krizon de la milito Sed estas frapante ke eĉ la amerikanoj devis konfesi Sur ĉiuj batalkampoj en la afrika dezerto kiel sur la glacigitaj ebenaĵoj de Rusujo la germanaj armeoj ekde la monato de novembro 1942 remarŝas **La renverso de la situacio okazis neatendite kaj preskaŭ samtempe de unu limo de la giganta batallinio al la alia. Ĉi karaktero de la okazoj miregigis ĉiujn observantojn'** ' Do, kiu estis venkinta? La Aliancanoj? Ili nur estis la punrimedo por Hitler Germanujo Venkintino estis MARIA! 2 2 43 Kandelfesto de Maria Stalingrado estis konkirata! 13.5 43 Fatimatago Tunis okupita! 15 8 43 Ĉieliro de Maria Sicilio okupita! 8 9 43 Naskiĝfesto de Maria Italio kapitulacas! 6 6 44 festo de la Sankta Norberto kiu apartenas kaj al Francujo kaj al Germanujo la Aliancanoj albordiĝas en Francujo, 15.8.44 Ĉieliro de Maria Alteriĝo en Toulon! Sekvo La tuta germana okcidentfronto estis malvolvata ekde la sudo! 12 9 44 Festo de la nomo de Maria la amerikanoj transpaŝas la germanan imperilimon! 8 5 45 festo de la ĉefanĝelo Mikaelo anĝelo de la germanoj! Batalhalto en Germanujo! 15.8.45 Ĉieliro de Maria Japanujo kapitulacas, kaj oni povas diri ke per tio la dua mondmilito finis! 8 9 51 Naskiĝfesto de Maria paco kun Japanujo (Ekde la 8 12 41 festo de la Senmakula Koncepcio de Maria Ameriko estis en la militstato kun Japanujo pro Pearl Harbour!) Diru mem ĉu povas esti hazardo tiu multego da venkoj ĝuste je la tagoj de Marifestoj? Kaj kvankam estas tre doloroza ĉi tiucito de malvenkoj por germano tamen ni katolikoj devas pensi laŭ la planoj de Dio ne laŭ naciaj vidpunktoj sole! Kaj se oni miras ke Rusujo, la lando la de bolŝevismo, fariĝis laŭ tia plano de Dio la punvergo por Hitler Germanujo oni devos atendi ĉu Dio pli poste ne punos de la Li uzitan punilon!

Kiam venos la paco por Germanujo? Ĉu ankaŭ tagon de Mari festo? Ni ne scias ĝin ankaŭ ne ĉu venos ankoraŭ tria multe pli terura mondmilito Sed ni posedas la eminentgravan antaŭdiron de Maria de Fatima Se oni plenumos Miajn petojn tiam Rusujo konvertiĝos kaj estos paco Se ne tiam tutmonda propagando malamika al la kredo disvastiĝos siajn herezojn kaŭzante militojn (oni atentu la multenombron!!) kaj persekutojn kontraŭ la Eklezio, multaj bonuloj estos torturataj la Sankta Patro devos suferi multon pluraj nacioj estos ekstermataj (Kion povas signifi tiu ĝis nun al ni nekonata teksto?) Sed fine triumfos Mia Senmakula Koro! Pli postaj antaŭdiroj de la Dipatrino al la nuna fratulino Lucio la plej maljuna el la Fatima infanoj, kompletigas tiun revelacion Por eviti tion Mi venos por postuli la konsekron de Rusujo al Mia Senmakula Koro kaj la kompenskomunion Se ne, tiam Rusujo disvastigos siajn herezojn en la tuta mondo Sed fine Mia Senmakula Koro triumfos. La Sankte Patro konsekros al Mi Rusujon kiu konvertiĝos, kaj al la mondo estos donacata tempo de paco Per tio ne finu ŝajnas ke sufiĉas por ekkoni ĉu estas senco en la mondhistorio kaj eĉ se A de Humboldt kaj aliaj nekreduloj ankoraŭ vivus, ili devus konfesi ke regas grandiozaj senco kaj justeco en la mondhistorio eĉ ili devus ekkoni, **'Ke la Plejaltulo regas en la regno de la homoj!** '

# PROTESTANTA PASTRO REVENIS AL LA S. t.a EKLEZIO



*Je la Vigilio de Kristnasko 1948 la Sankta Patro, Papo Pio XII parolis: 'La patrina okulo de la Eklezio sekvas tiujn animojn, kiuj portempe estas perditaj, aŭ kiuj estas en danĝeroj, kaj atentas ilin kun gardema amo kaj duobla zorgo La Eklezio ne koleriĝas Ĝi preĝas kaj atendas atendas je la reveno de tiuj filoj dume ĝi pensas pri rimedoj kiuj povas plifruigi tiun horon de reveno.'*

*Tri jarojn poste, du tagojn antaŭ la Kristnaska Festo 1951a: En la S ta Aŭgustena-preĝejo-kapelo de la Seminario en Mainz okazas la sacerdotiĝo de lia moŝto Rudolf Goethe, iama predikanto kaj pastro de la Evangelia Eklezio en Germanujo Li estis kaj kun speciala permeso restos praktikanta la edziĝan vivon*

La Protestanta Eklezio en Germanujo, ĝenerale konata sub la nomo de 'Evangelia Eklezio sentis gravan subpremon ek de la akaparo de Hitler Ĉi tiu batalo kaŭzis ke multaj protestantaj teologoj ekpensis pri la esenco de la Eklezio kaj pri la problemoj kiujn ilia Eklezio devis solvi

Rudolfo Goethe estis tiam pastro de la Evangelia Eklezio en Offenbach mal granda vilaĝo apud Frankfort En la domo de la familio Dach fondiĝis rondo de teologoj kaj laikoj kiuj interparoladis kaj kiuj ĉiuj deziregis efektivigi la vortojn de Kristo Por ke ĉiuj estu unu

Ĉi tio estis en 1934 Je dimanĉo la vikario de la katolika preĝejo predikis pri la sankteco de la edzeco Verŝajne personoj el la rondo de Dach ĉeestis ĉar post kelkaj tagoj Rudolfo Goethe invitis la vikarion klarigi la saman temon en la rondo kiel li tion faris sur la katedro en la preĝejo. Tiel kontaktiĝis la vikario d-ro K Schmidt kaj la rondo en la familio Dach.

Jam je la unua vespero ke la vikario ĉeestis la kunvenon, li konstatis ke la homoj ne nur teologie disputas ĝisfunde sed ke ili fervore preĝas, kaj eĉ tiel ke li estas kortuŝata kaj tuj lin kaptas la ideo, ke Dio ĉi tie speciale efikas per Sia Graco Kiam la episkopo de Mainz vizitas Offenbach por la Konfirmo li kunvenas en la domo de Dach kun la rondo Kaj poste li daŭrigis la kontakton Kaj kiam li devas elparoli sian opinion pri la grupo li diras Tiel la unuaj Kristanoj certe vivis, unu en la preĝado kaj unu en la praktikado de la Karito

La milito eksplodis kaj post unu jaro la vikario estis nomata milita pastro en Berlino kun la grava tasko subteni la mortpunitojn en iliaj lastaj momentoj Multaj el la komdamnitoj eĉ rifuzis rekoni Dion Sed la vikario ne forgesis siajn protestantajn amikojn en Offenbach Se li renkontas malfacilan taskon se iu pekanto ne volas repaciĝi kun Dio li telefonas el Berlino al s ino Dach kaj nur diras Morgaŭ je la sepa Tio estis la horo de la ekzekuto Kaj en Offenbach oni kunvenis en la domo de la familio Dach tra pasis la tutan nokton preĝante kaj ili la protestantoj, komencis preĝi la Rozarion kaj la Litanion de la Sankta Koro Eĉ ne unu el tiuj kiujn mi devis subteni forlasis la vivon sen pekliberigo Neniu mortis sen repaciĝo kun Dio laŭ la raporto de la milita pastro Ni pensas pri la promesoj de Maria en Fatima, kaj pri tiuj de Kristo al Margareta Maria Alacoque. En la jaroj post la milito 150 personoj el ĉi tiu rondo alprenis la Katolikan Kredon S.ino Dach estis inter la unuaj S-ino Goethe akceptiĝis en la Katolika Eklezio en 1948 kaj en 1950 ŝia edzo Rudolfo, Je la 16a de Decembro 1951a la episkopo de Mainz, mons-ro d ro Alberto Stohr komunikis en ŝia dioceza revuo ke Rudolfo Goethe kun speciala permeso de la Papo recevos la Sanktan Sacerdotigon. Ek de 1947a la Papo estis daŭre informata.

En fabrikoj kaj en aliaj lokoj oni multe klaĉadis pri tio, ke tamen la Papo donis permeson al sacerdotigo, kaj al samtempa edziĝa vivo Nia spaco ne per-

mesas doni eksplikojn pri tio en la nuna numero Se ekzistas bezono al tio oni bonvolu skribi kaj certe la redakcio respondos en venonta numero
Jen du ekstremoj En Parizo katolika pastro herezas en Mainz protestanta pastro konvertiĝas Sed laŭ niaj spertoj feliĉe la lasta okazas pli ofte ol la unua Jen la Vigilio de Pasko alproksimiĝas Ni preĝu por la konvertitoj en tiu tago

J

# LA FRINGO DE LA PAPO

Esti virino kaj konservi sekreton estas du aferoj kiuj neniam akordiĝas kaj la malplej virina virino estas pli kapabla gardi sian honoron ol sekreton Vi dirus ke mi troigas sed mi scias rakonton kiu subtenos mian teorion
Papo Johano la XXIIa kutimis viziti monaĥinejon kaj tie ofte konsentis favorojn Estis tre bonfama monaĥinejo kie Satano akiris neniun sukceson krom iu eta peketo kiam ili babilis kun vizitantoj trans la krado Ĉar vi scias ke la malamiko de la homaro nur povas havi influon je monaĥinoj pro ilia pasio por babilado La Sankta Patro iun tagon venis al ili sur sia mulo kiun ili kisis kaj Dio scias kiom da indulgencoj ili meritis! La monaĥa tribo estas nesatigebla kaj la monaĥinoj estis prenintaj en siajn kapojn la plej fantazian ideon imageblan ili volis akiri la rajton konfesigi unu la alian anstataŭ iri por tio al sacerdoto
Sankta Patro diris la abatino parolante senkaŝe, kiel virino mi devas konfesi ke ekzistas ne granda sincereco en la pekkonfesoj kiujn ni faras al viro Ni ja klopodas neglekti cent neniaĵojn etajn peketojn, kiujn ni nur ruĝigante povus konfesi al la alia sekso Ĉar viro ofte emas primoki erarojn, pri kiuj monaĥino akuzas sin
Vi do deziras inajn konfesprenantojn! diris la Papo Kiel io tia povus esti ebla? Mi bedaŭras ke mi devas rifuzi vian peton pro grava principo Tiu ĉi sakramento postulas grandan sekretemon kaj kiel vi scias la virina raso estas tro babilema Ĉu ne virina babilemo kondukis al origina peko? Via sekso ne povas gardi sekreton Sed se vi deziras, mi volas esplori la aferon kaj ekscii per miaj propraj eksperimentoj ĉu oni eble maljuste misfamigis la virinojn en ĉi tiu rilato
Ne estis la unua fojo ke la Abatino ĝenis Lian Sanktecon pro ĉi tiu afero kaj la Papo jam faris siajn preparojn antaŭ sia foriro el la palaco Li do prenis malgrandan skatolon kiun li estis alportinta kun si sur sia mulo kaj transdonis ĝin al la abatino
Vidu li diris mi volas meti ĉi tiun skatolon en viajn manojn por gardi ĝin ĝis mia morgaŭa reveno Ne malfermu ĝin antaŭ mia alveno, ĉar en tiu kazo vi ne akirus la deziratan favoron Se la skatolo morgaŭ estos ankoraŭ fermita mi konsentos vian peton
Li foriris kaj ĉiuj monaĥinoj grupiĝis ĉirkaŭ la mistera skatolo kriantaj Ho lasu min tuŝi gin lasu min vidi ĝin!
Ili luktetis por elmanigi ĝin unu de la alia sed feliĉe neniu klopodis malfermi ĝin kaj la monaĥinoj enlitiĝis cerbumante pri la enhavo de la skatolo Neniu tre bone dormis kaj precipe la abatino estis preskaŭ malsana pro scivolemo Dum la preĝoj la sekvantan matenon ĉio konfuziĝis La tuta konvento estis febre ekscitita ĉar ne bezonas multo por turni la kapon al monaĥino!
Oh diris la abatino al sia nervema filinaro la Papo klopodas malsanigi nin pro ĉagreno. Kio povas esti tiu granda sekreto kion li volas kaŝi antaŭ ni? Kial li ne fidas nin konigante ĝin al ni? Mi devas diri ke li ne pritraktas nin monaĥinojn per granda honoro! Ni malfermu la skatolon nur por venĝi nin kontraŭ li Kiu povus rakonti al li kion ni faris? Ni facile povos refermi la skatolon ĝuste kiel ni trovis ĝin
Ĉiuj monaĥinoj ekĝojis dum tiuj paroloj La abatino malfermis la fatalan skatolon Kion ŝi trovis en ĝi? Malgrandan fringon La birdo rapide flugis al la plafono kaj gaje kantante trifoje cirkulis super iliaj kapoj kaj tiam forflugis tra malfermita fenestro en la liberecon La abatino kaj ŝiaj monaĥinoj aŭdis frapon sur la pordo kaj la Sankta Patro eniris ridetante
Ha jen mia skatolo! li ekkriis Nun ni vidos ĉu virinoj estas fidindaj Car la de vi deziratan favoron mi likigis en ĝin sigelita Oh! Oh! li aldonis ridante, kiam li trovis la skatolon malfermita kaj ŝtelrigardis la enhavon, via favoro forflugis! Adiaŭ miaj deskretaj kaj fidindaj fratinoj! Ne

ekzistos ina konfesprenanto.'

'Des pli bone,' iu monaĥino diris mallaŭte, 'mi tute ne simpatiis kun la ŝanĝo. Finfine unu virkonfesprenanto estas preferebla!'

Abbé Grécourt (1683-1743)
Esperantigis T.D.

Rimarko de la tradukintino: Tiu ĉi rakonto jam okazis antaŭ jarcentoj, intertempe multo ŝanĝis kaj evoluis, ĉar nuntempe la virinoj eĉ la laikaj ne plu estas tiel scivolaj kaj nefidindaj. Ankaŭ neniu virino elpensus tian frenezan ideon kiel tiuj mezepokaj monaĥinoj!

## NI AŬDIS,

ke la Esperanto-klubo de la Universitato Medicina en Sendai (Japanujo) eldonis Esperanto-revuon 'Verda Tero' kun la celo enkonduki Esperanton en la Medicinan Mondon. Diversaj profesoroj opinias ke la universitata studado ĉiam pli malfaciliĝas pro la multeco kaj diferenco de la lingvoj

ke ĉe la Agrikultura Fakultato de la Universitato de Nihon (Japanujo) doktoriĝis 4 studentoj kiuj verkis sian disertacion en Esperanto

ke en Aŭstralio, kien elmigras homoj el diversaj landoj kreskas la intereso por Esperanto kaj ke la Servo por la Enmigrantoj en Aŭstralio decidis fondi specialan komision en kunlaboro kun la Esperanto-ligoj en aliaj landoj por la elmigrado de Esperantistoj al Aŭstralio

ke en Wörgl (Tirolo) je la 27a de Julio venonta okazos la inaŭguro de monumento honore al d-ro Zamenhof kaj lia kreo Esperanto laŭ la iniciato de s-ro Hans Steiner

ke en Ĉeĥoslovakujo ek de la 1a de Januaro pasinta la aktiveco de Esperanto ligoj kaj revuoj ne plu estas permesata. Oni atendas pli favorajn tempojn

ke en Francujo ekzistas Esperanta Kulturdomo en 'la Kastelo de Gresillon apud Baugé. Informoj pri kursoj, ktp. ĉe f-ino Jeanne Dedieu, 3 rue Arzac TOULOUSE (leteroj kun respondkupono)

ke en Indonezio la movado revekiĝas speciale en la urbo Djakarta.

ke en Titisee (Nigra Arbaro), Germanujo okazis internacia skirenkontiĝo de 27a de Decembro ĝis la 1a de Januaro. Vespere oni priparolis pri 'La filmo en la vivo de junaj homoj

ke ĝis la 31a de Januaro 1952 687 personoj aliĝis al la Universala Kongreso ĉijara en Oslo. Ili estas el 26 landoj

ke la unua parto de la jarlibro de UEA aperis. Ĝi enhavas 2018 delegitojn el 60 landoj

ke la ekskanceliero d-ro Luther dum Eŭropo-vespero en Traŭnstein pledis favore de Esperanto kiel lingvo por internaciaj konferencoj

ke dum 1951 en Grekujo 1096 lernantoj de gimnaziaj kaj akademiaj institutoj partoprenis la Esperanto-kurzojn

ke la Brazila Ministerio de Edukado eldonis biografion de la eminenta figuro Rui Barbosa. La libro enhavas 300 paĝojn. Verkis ĝin F Nery kaj tradukis en Esperanton Jozefo Joels

ke la Medicina Revuo Acta Orthopedica Belgica (Bruselo) regule publikigas resumojn en Esperanto de la plej gravaj artikoloj

ke la Agence Mondial de Presse en Parizo nun eldonas semajnan bultenon pri mondfederalismo kaj mondcivitanoj en Esperanto, krom en la lingvoj angla germana, franca kaj itala

Vi ŝatus legi pli da katolikaj sciigoj el la tuta mondo?
Tamen pripensu ke ili ne povas esti aktualaj en monata revuo
Kial vi ne regule aŭskultas la radio-elsendojn de la Katolika Radio Stacio Hilversum en Nederlando? Ĉiu sabatvespere je la 23 15h M E T ĝi dissendas en Esperanto Ĉiun lastan sabaton de la monato ĝi donas resumon de l' tutmonda situacio Dum la monatoj Aprilo Majo kaj Junio la ondolongo estos 402 m
Bone pripensu ke la daŭrigo de la elsendoj dependas de la eksterlandaj raportoj Do bonvolu skribi al
K R O Emmastraat 52 HILVERSUM (Nederlando)

Radio Stacio MADRID (Hispanujo) elsendas en Esperanto ĉiun Merkredon de la 19, 30-20 00 h. M E T
Ondolongoj 233 kaj 42.33 m, Raportoj al Radio S.E.U., Seccion Esperanto: Diego de Leon 49, MADRID.




9 s-ro Ulrich Hoffmann, Berlin-Neukölln ( Germanujo)
10. s-ro d.ro Bruno Marini, Trieste (Italujo)

Jen la unua deko de subtenantaj membroj Ili pagis la duoblan abonkotizon. (Kelkaj eĉ pli)
Ankoraŭ multaj katolikaj samideanoj atendas vian helpon.
Ni jam prenis aranĝojn por ke via helpo efikos duoblan rezulton!
Vi povas pagi al ni aŭ al niaj reprezentantoj



# Korespondado

a ro F Bijlard, Gooiberg 18, BUSSUM (Nederlando) deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj

## JENAJ LIBROJ ESTAS I.A. HAVEBLAJ ĈE LA LIBRO-SERVO:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Insbrücker | Examenopgaven A en B | | | ƒ 1.25 |
| K.Kalocsay | Dekdu poetoj | broŝ. ƒ 2 | bind. | ƒ 2.50 |
| Luycken | Stranga Heredaĵo | | bind. | ƒ 2.90 |
| Luycken | Pro Iŝtar | | tolbind | ƒ 4.50 |
| G.Papini | Historio de Kristo,575 pp. | broŝ. ƒ 4.25 | tolbind | ƒ 7. |
| Storm | Du Majstronoveloj | | bind | ƒ 2.10 |
| Turgenjev | Elektitaj Noveloj | | | ƒ 0.75 |
| Wisemann | Fabiola, ilustr, 445 pp. | broŝ. ƒ 4.50 | lukse bd | ƒ 8. |
| Plena Vortaro de Esperanto | | | tolbind | ƒ11 40 |
| Naŭlingva Etimologia Leksikono | | | tolbind | ƒ 7.-- |
| Insignoj | kun kruceto en la stelo, pingl. butonoj broĉoj | | | ƒ 1. |
| | sen kruceto pingl. butonoj, broĉoj, pend. U.E.A. | | | ƒ 1. |
| | simplaj butonoj | | | ƒ 0.35 |
| | simplaj broĉoj | | | ƒ 0.50 |

nur por kleraj plenkreskuloj+
Mendu ĉe f-ino T.Durenkamp, Kasperspad 91, poŝtkonto 214090, aŭ al niaj reprezentantoj. Sendkostoj estos alkalkulataj. (10%).

Boekhandel-Offsetdrukkerij "Elinkwijk"-Amsterd. straatweg 480-482-Utrecht-Tel. 10757